

La Riverego

Ĉe la fino de la tero	2	AMU Poznanon... ankoraŭ !	18
NASK kaj KTF denove kune	7	Feliĉan novan jaron... 1200 !	22
Ĉe amikoj en Kubo	10	Tankaumis ARE-anoj	23
Poliglota Novjorke	13	Poemoj de Eudore Évanturel	24
Maloftaj fundamentaj vortoj	17	La Idoj de la Suno	26



Ĉe la fino de la tero
Au bout du monde




Ête la fino de la tero

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

Tour de la Gaspésie à cinq : petite école, baleines, ours, Rocher Percé et fous de Bassan...

« Vi jam estas en Kanado kelkajn jarojn kaj vi ankoraŭ ne estis en Gaspegio ? » foje demandis miaj kanadaj amikoj. Kelkaj el ili estas tiom enamiĝintaj al tiu parto de Kebekio, ke ili iras tien ĉiujare. Ni revis iri al Gaspegio jam, ekde kiam ni translokiĝis al Kanado, kaj la preteksto finfine troviĝis, kiam mia patrino venis viziti Kanadon la unuan fojon.



La rivero, kiu pensas ke ĝi estas oceano...
Gaspegio — aŭ Gaspé-duoninsulo — troviĝas je

unutaga aŭta veturo de Montrealo, nord-oriente laŭ la rivero Sankta-Laŭrenco (en Kebekio oni nomas ĝin simple « la Rivero »). La rivero komenciĝas ĉe la Grandaj Lagoj, transiras Novjorkion, Ontarion kaj Kebekion, kaj ekde la urbo Kebeko ĝi subite larĝiĝas, tiel ke, post tricento da kilometroj alvale, vi ne plu povas vidi la alian bordon, kaj iom post iom ĝi transformiĝas en la golfon Sankta-

Laŭrenco : vere, jen la rivero, kiu pensas, ke ĝi estas oceano...

Ni ekiris al la tuttaga vojaĝo norden kvinope en eta Toyota Prius — Esmeralda (ĉu via aŭto ne

havas nomon ? ☺), kun mia patrino, mia edzo Joel, nia Esperanta amiko Deno kaj Michael : 16-jaraĝa nevo de Deno el Usono. Tre miksitaj kompanio kun tri lingvoj : angla (parolata de ĉiuj krom mia patrino), rusa (parolata de mi, mia patrino kaj Deno ĝis certa grado), Esperanto (parolata de Joel, Deno kaj mi) kaj jen alia universala lingvo : la gestolingvo, aparte sukcesa inter mia patrino kaj Michael, kiuj ne parolas la lingvon de la alia. Estis kortuŝe vidi, kiel ŝi kaj Michael sukcesis komunikiĝi tute sen uzi lingvon : ili ofte interŝanĝis multkolorajn ŝtonetojn kolektitajn sur la plaĝo, sen diri eĉ unu vorton. En la aŭto la konversacio jen angle, jen ruse, jen Esperante, foje akompanata de malkontenta grumblado de Michael : « Ĉu vi denove parolas pri mi ?.. »

Eta Lernejo

Estis jam vespero, kiam ni alvenis al la gastejo « La Petite École » (« Eta Lernejo »), kiu troviĝas en la granda nacia parko — la parko Forillon. Ankoraŭ ne estis tro malfrue, sed la laborantoj de la gastejo jam foriris hejmen (je nia granda surpriziĝo). Ili lasis por ni la ŝlosilon en la koverto kun niaj nomoj, karton kun bondeziroj pri la restado, instrukciojn pri la loko kaj la




telefonnumeron uzotan, se estus io ajn urĝa. La gastejo antaŭe estis vera lernejo (pro tio la nomo) kaj la dormejoj troviĝas en la iamaj klasĉambroj. Ni havis la tutan gastejon por ni, ĉar ni alvenis iom ekster la sezono (la sezono en Gaspegio daŭras nur du monatojn : julio kaj aŭgusto, kaj ni alvenis en junio), je granda ĝojo de mia panjo (« Oni povas havi la tutan etaĝon por si mem, kaj eĉ elekti sian propran duŝejon! ») kaj je grumblado de Michael (« Oni devas eliri el la ĉambro por iri al la duŝejo ?! »).

La loko estis iom aparta, ĉar tuj ekster ĝi troviĝis... tombejo ! Ni ne povis ne iom ridi, kial oni ne aldonis la « belan vidon al la tombejo » en la priskribo de la loko, kaj ke eble la prizorgantoj de la hotelo, kiuj lasis por ni la ŝlosilojn kun bondezira karto, estas fantomoj, ĉar ili ne estas



En la nacia parko Forillon

videblaj kaj komunikas per mesaĝoj ! 😊 Tiu ja estus perfekta loko por hororfilm, aparte ĉar la gastejo troviĝas ĉe la Kabo de Ostoĵ : en la antaŭaj tempoj la plaĝon kovris balenaj ostoj, ĉar ial balenoj aparte emis ĵetiĝi sur la bordon en ĝuste tiu loko. En la turista gvidilo oni skribis, ke en la 19-a jarcento unu el vizitantoj eĉ notis en sia vojaĝlibro, ke la fenestroj de la ĉambro devas ĉiam esti fermitaj « por ne aŭdi la laŭtan ĝemon de la balenoj kaj eviti la odoraĉon de putriĝanta balenkarno ».



Balenoj kaj ursoj

La nacia parko Forillon, kie troviĝis nia gastejo, antaŭe estis loko por ĉasado kaj fiŝkaptado de la indiĝenoj, kaj nun estas naturrezervejo, kie oni povas hazarde renkonti alkojn, histrikojn, fokojn kaj plurajn aliajn bestojn. En la ĉirkaŭaj akvoj oni povas observi balenojn : se oni aparte bonŝansas, oni povas vidi eĉ la endanĝerigitan bluan balenon — la plej grandan beston en la mondo, kiuj longas ĉ. 30 metrojn kaj pezas ĉ. 180 tunojn.

En la tuta mondo restas nur kelkaj miloj de tiuj bestoj, kaj la Golfo Sankta-Laŭrenco estas unu el kelkaj malmultaj lokoj, kie oni povas renkonti tiujn majestajn bestojn. Mi neniam vidis balenojn antaŭe kaj tiom antaŭĝuis tion, ke mi apenaŭ povis dormi la antaŭan nokton, kaj mia

patrino ĝis la lasta minuto ne povis kredi, ke ni vere vidos balenojn. La sola, kiu grumblis, estis Michael : « Kial necesas foriri tiom frue ? Kial oni ne povas fari tion posttagmeze ?.. » — « Ĉar oni povas vidi balenojn nur matene, kiam ili vekiĝas kaj matenmanĝas... Vespere ili dormas »...

Ni estis aparte bonŝancaj en tiu ekskurso, ĉar ni vidis almenaŭ dudekon da balenoj de multaj specioj, eĉ du maloftegajn blujajn balenojn. La



trovado de balenoj estis komuna tasko : ĉiuj ekskursanoj atente rigardis la akvon kaj, se ni vidis fontanon de akvo elirantan al la ĉielo, aŭ strangan moviĝon en la akvo, ni indikis la direkton al la kapitano, kiu stiris la boaton al tiu loko. Duono de la tempo estis falsaj alarmoj, sed, kiam mi vidis parton de tiu grandega besto, eĉ de malproksime, mi sentis, ke mi estas inicita en la grandan misteron de la naturo. La sola homo, kiu tute ne atentis tiun ĉi balen-spektan ĉasadon, estis Michael, kiu trankvile dormis sur la benko de la ŝipo, ĉi-foje, je la grumblado de sia onklo Deno : « Ni pagis 60 dolarojn por vidi la balenojn, kaj vi dormas ?! » Alvenante al la haveno, nin atendis surprizo : de la boato ni vidis sur la montara deklivo familion de tri nigraj ursoj : ursinon kun du ursidoj (kia neatendita surprizo !). Kiam mi demandis al mia patrino, kion ŝi plej ŝatis el la ekskurso, ŝi senhezite respondis : « Ursojn! » « Vi vidis la unuan fojon balenojn, eĉ la plej maloftan specion, kaj vi plej ŝatis... ordinarajn nigrajn ursojn ?.. »



La Truita Roko

Nia vizito ne estus kompleta sen vizito al la urbeto Percé, sendube, la plej konata loko en la tuta Gaspegio pro la fama « Truita Roko » — « Rocher Percé » —, fama formaĵo kaj natura gotika arko, kiu donis la nomon al la urbo. La indiĝenoj nomis ĝin Sigsoq — « la nudaj rokoj » —, kaj ĝi estis nomita « Rocher Percé » de Samuel de Champlain, la « patro de Nova Francio », en fora 1607. Ĝi nomiĝas tiel, ĉar ĝi estas kvazaŭ truita de giganta pikilo. La roko nun havas unu truon, sed antaŭ du jarcentoj ĝi havis du truojn, kaj en la tempo de Champlain — eĉ tri truojn. En la 19-a jarcento parto de la roko kolapsis pro la erozio, kaj la rokoj daŭre korodiĝas kaj ĉiujare ĵetas multajn tunojn da ŝtono en la golfon : estas eĉ malpermesate navigi ĝis la roko mem, pro la danĝero esti trafita per falantaj ŝtonoj. La Truita Roko altiras vizitantojn jam ekde la 19-a jarcento. Trankviliga kaj majesta, ĝi staris tie jarmilojn, silenta atestanto de ĉiuj ŝanĝiĝoj : la veno de

eŭropanoj, militoj, ŝanĝiĝo de povoj kaj registaroj... La roko kvazaŭ havas malsaman karakteron en malsama tempo kaj vetero : ĝi aspektas misteroplena matene, kiam ĝi estas envolvita en blankan nubokovrilon — tiam vi povas vidi nur ĝian supron, kiu elstaras, kiel eta ŝipeto en granda lakta maro. Ĝi aspektas solena tage, kiam la

sunradioj dispelas la matenan nebulon kaj kiam oni vidas klare ĉiun sulkon sur la vizaĝo de la avo-roko. Ĝi aspektas milda vespere, kiam la sunsubiro koloras ĝin en diversajn gradojn de la ora kaj ruĝa koloroj. En unu el la indiĝenaj lingvoj la vorto

gespeg (« Gaspé » — Gaspegio) signifas « terfino », kaj, starante tie apud la Truita Roko kaj rigardante al la maro, vi komprenas, kiom trafa estas tiu nomo... Vi ja sentas vin staranta ĉe la fino de la tero...



Birda maro

Oni povas plej bone vidi la rokon per la ŝip-ekskurseto, kiu navigas ĉirkaŭ la Truita Roko kaj portas la turistojn kaj la park-laboristojn al la insuleto Bonaventure, kiu situas kelkajn kilometrojn de la ĉefa tero. Antaŭe tie loĝis kelkaj maristaj familioj, kies domojn oni povas vidi ĝis

nun, sed nun ili estas vakaj : kelkaj el ili fariĝis muzeoj, kaj la tuta insulo mem estas naturrezervejo. Ĝi estas kaj unu el la plej grandaj sanktejoj en la mondo por migrantaj birdoj, kun preskaŭ 300 birdspecioj en diversaj tempoj kaj preskaŭ 300 mil individuaj birdoj — vera paradizo por la

birdŝatantoj. Ĝi estas hejmo por la plej granda kolonio en la mondo de nordaj suloj — grandaj blankaj birdoj kun elegantaj hel-flavaj kapoj kaj nigraj, kvazaŭ ŝminkitaj okuloj kaj beko. Unu flanko de la insulo tute apartenas al tiuj birdoj : vi vidas la blankajn birdojn tiom longe, kiom povas

atingi via rigardo. La nordaj suloj vivas en paroj, kiuj ofte restas kune la tutan vivon, kaj ili povas retrovi sian kunulon senerare en tiu birda maro, inter dekmiloj da aliaj birdoj ! Tre amuzis nin interesa rito : kiam la vir-sulo revenas al sia kunulino sidanta sur la ovoj, unu momenton ili kvazaŭ ne rekonas unu la alian kaj kvereletas. Poste ili repaciĝas en eleganta danco, kunmetante kaj suprenigante la bekojn al la ĉielo.

Kiam ni foriris de la insulo Bonaventure per la lasta vespera ŝipeto, mi pensis, kiel sentiĝis vivi en tiu insulo, ĉirkaŭite de la naturo kaj birdoj kaj kvazaŭ perditaj al la ekstera mondo. Mi estus ĝoja pasigi tie iom da tempo, eble tutan someron, sed mi tamen preferas loĝi sur la ĉefa tero, inter homoj, en la kaoso de la urbega vivo. Tamen, la vizito al lokoj kiel Gaspegio, kaj aparte al tiu ĉi insulo, estas necesa por rekrei trankvilan spacon en mia koro kaj malrapidigi la frenezan ritmon de mia vivo. Revenante per la ŝipeto al la ĉefa tero, ni estis silentaj. Mi pensas, ke miaj kunvojaĝantoj, same kiel mi, bezonis esti solaj kun siaj pensoj. Kiam mi fermis la okulojn, mi vidis la blankan birdan tapiŝon kaj la elegantan dancon de la belegaj kaj fidelaj nordaj suloj...

Ricevu KEA-stipendion por partopreni Esperanto-eventojn !

La Kanada Esperanto-Asocio (KEA) disponigas ĝis po du stipendiojn de ĝis 1000 CAD por ebligi partoprenon en la ĉi-jara Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK). Ĉiu petanto,

(a) estu Kanada loĝanto ;

(b) estu membro de KEA. Ni bonvenigas petojn de novaj membroj de KEA, kaj oni eĉ povas aliĝi kaj tuj poste peti stipendion ; kaj

(c) sendu mesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton, al Geoffrey Greatrex <greatrex(ĉe)uottawa.ca>, ĝis 15-a de aprilo 2016. Estas rekomendinde, ke oni priskribu siajn jamajn spertojn en Esperantujo, kaj ke oni skribu sian mesaĝon en Esperanto, sed vi tamen povas skribi france aŭ angle. Ne timu, se via Esperanto ne estas perfekta ; vi havas pli bonan ŝancon ricevi stipendion, se via mesaĝo estas skribita en Esperanto kun eraroj, ol se ĝi estas skribita en alia lingvo.

Ni kutime ricevas malmultajn petojn por stipendioj, do ĉiu peto ja konsideriĝos. Decidos pri la aljuĝo de stipendioj la eduka komisiono de KEA.

Kuraĝige salutas,

Matthew (Mateo) Chisholm, KEA-Sekretario



NASK kaj Kino-teatro-festo : denove kune !



La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) ankaŭ ĉi-jare kunigas la fortojn kun Kino-Teatro-Festo kaj invitas vin al unu el la plej elstaraj okazaĵoj en Esperantujo ! NASK — la plej longdaŭra Esperanto-kursaro en Norda Ameriko — estas unu el la plej gravaj aktivaĵoj subtenataj de ESF. Ĝi estas unika kleriga evento, kiu altiras lernantojn de ĉiuj lingvoniveloj kaj elstarajn Esperanto-instruistojn el la tuta mondo.

La kursaro en 2016, jam la trian fojon, estos sur la bela verda kampuso de la universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino. Same kiel en 2015, Kino-Teatro-Festo (KTF) okazos samtempe kun NASK, tiel ke la partoprenantoj de ambaŭ eventoj povu partopreni en la komunaj aktivaĵoj kaj vidi la finan produkton de la metiejoj de KTF. La plena programo okazos inter la **28-a** de junio kaj **7-a** de



julio kaj la mallonga programo inter la **28-a** de junio kaj **3-a** de julio. Estos ankaŭ diversaj aliaj aktivecoj : esplorado de muzeoj, butikoj kaj restoracioj de la urbo, ĉio en piedira distanco de la kampuso. Ambaŭ grupoj povos partopreni la feston de la 4-a de julio, kun piroteknikaĵoj !

Ĉiun jaron oni petas al famaj instruistoj kaj movadanoj el la tuta mondo instrui ĉe NASK, kaj ankaŭ en 2016 ni ĝojas anonci stelan instruistan teamon !

La superan kurson gvidos **Bertilo Wennergren**, membro de la Akademio de Esperanto, la Esperantisto de la Jaro 2006, muzikisto kaj la aŭtoro de la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, *Detala Gramatiko de Esperanto* kaj *Landoj kaj lingvoj de la mondo*.

Tim Morley estos la instruisto de la meznivela kurso. Diplomita instruisto de la

angla, Tim, interalie, gvidis esperantigon de OpenOffice kaj instruas la lingvon interrete pere de italki.com (lastatempe, lia priesperantuja adaptaĵo de la fifama kartludo *Cards Against Humanity* furoris en diversaj Esperanto-aranĝoj en Eŭropo).

Ĵenja Bondelid (“Helena” el la videokurso *Esperanto — Pasporto al la Tuta Mondo*) gvidos la komencintan kurson. Fondinto de la Kino-Teatro-Festo, Ĵenja diplomiĝis pri la instruado de Esperanto ĉe la altlernejo Principia ; ŝi reĝisoras, danckomponas kaj prezentas sur loka scenejo en Vaŝingtonio.

Lee Miller, profesia interpretisto de la Usona Signo-Lingvo, gvidos la postbazan kurson (Lee estas partoprenanto de la kursaro ekde 2000 kaj nun li estas jam delonge unu

el ĝiaj gvidantoj). **Hoss Firooznia**, la redaktoro de Usona Esperantisto, estos helpinstruisto kaj redaktoro de « La NASKa Fasko » kaj gvidos eksterkursajn programojn.

Klaku sur bildojn por spekti du mallongajn videojn pri NASK fare de Fábio Monteiro



La bazaj kostoj por 8-taga NASK/KTF estas **\$760** (USD), por 4 tagoj de NASK/KTF **\$430** se vi aliĝos antaŭ la 15-a de marto (poste la prezo altiĝos je \$50). Stipendia helpo haveblas por plentempaj studentoj kaj instruistoj, kaj ankaŭ loĝantoj en latinamerikaj landoj. Vizitu la retejon nask.esperantic.org por pli da informoj pri NASK kaj www.kotofesto.org pri KTF. La aliĝilo estas havebla laŭ peto al la administranto de la kurso, Ellen Eddy, ĉe EDDYELLEN@aol.com.

[Laŭ esperantic.org]



Ĉe amikoj en Kubo... denove !



Trefflé (Trefleo) Mercier

De nouveau, Trefflé Mercier a visité Cuba l'année dernière, à l'occasion du 6e congrès de l'Association cubaine d'espéranto, et a particulièrement apprécié la simplicité, la gentillesse et l'amabilité des Cubains.

De la 18-a ĝis la 22-a de novembro 2015 mi havis la plezuron partopreni la 6-an Kongreson de Kuba Esperanto-Asocio en Havano. La tuta aranĝo konsistis el tri aktivaĵoj :

1) Simpozio « Esperanto, lingvistika kaj socikultura fenomeno », okazinta laŭ la invito de la Universitato de Havano la 17-an de novembro. La simpozio estis planita por kubaj neesperantistaj lingvistoj kaj kunaŭspiciita de la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko kaj la Centro de Aplikata Lingvistiko. Ĝi okazis por la unua fojo kaj

celis transdoni sciencan bildon pri la fenomeno Esperanto. Tiu simpozio altiris tridekon da reprezentantoj de filologiaj fakultatoj, esplorantoj

kaj institucioj rilataj al lingvistiko, instruado de fremdaj lingvoj kaj tradukado. Prelegis, interalie, pri Esperanto Profesoro Doktorino Sabine Fiedler el la Universitato de Lepsiko, Germanio ; Profesoro Doktoro Duncan Charters el Principia College, Ilinojso, Usono ; Profesoro Doktoro Orlando Raola el Kalifornio, Usono ; Juan R. Rodríguez el Santiago de Cuba. Tiu lingvistika simpozio estis



La kongresejo en Havano (kvartalo El Vedado) (arĥitekta kolegio en la stilo « art déco ») tute apud la fama marborda promenejo Malecón.

bela okazo science pritrakti Esperanton, kaj oni esperas, ke ĝi donos fruktojn en la formo de E-kursoj ĉe kubaj lernejoj, precipe universitatoj. Ĉu la koncepto ne aplikiĝus ankaŭ al nia lando, kie oni povus organizi tiajn simpoziojn por enkonduki kursojn en lernejojn ?

2) AMO-16 « Konsciigo, Kapabligo, Komunumo : Paŝoj al Plia Profesiigo ».

Tiu AMO-seminario (aktivula maturiĝo) konsistis el kvin temoj, daŭris du tagojn (18-19-an novembro) kaj estis kunordigita de Maritza Gutiérrez González, bone konata pro sia implikiĝo en UEA kaj pro la kutima dimanĉa voĉo ĉe Radio Havano Kubo. La diversaj temoj de tiu dutaga AMO estis kondukita de Orlando Raola, Julián Hernández Angulo, Duncan Charters, Maritza Gutiérrez González kaj Vilhelmo Lutermano. Estis mia una sperto pri tiuj AMO-



Interkona vespero : oni dancis, kantis kaj interkonatiĝis



Trefleo kun geamikoj de la kongreso : hispano, du kubaninoj kaj usonanino

seminarioj. Kvankam mi ne ĉeestis ĉiujn sesiojn, estis interese konstati, kiel diversaj aktivuloj pri Esperanto agas en sia medio. Ekzemple, dinamika

junulo el Guantánamo klarigis, kiel li instruas Esperanton per ludoj kaj sportoj kun gelernantoj.

3) 6-a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio.

Ĝi estis la vera kongreso, kiu daŭris du plenajn tagojn (20-21-a de novembro) kaj allogis 126 aliĝintojn. La plimulto venis el ĉiuj anguloj de la insulo, sed ankaŭ multaj el diversaj aliaj landoj, kiel Kanado, Usono, Brazilo, Islando, Belgio, Nederlando, Germanio, Hispanio kaj Rusio. Tio estis preskaŭ internacia kongreso, kiu rememorigis al mi antaŭan tiel agrablan eventon, la 95-an Universalan Kongreson de Esperanto en tiu sama urbo en 2010.

Ĉi-foje la du ĉefaj programeroj okazis ne en la Kongresa Centro de Havano, sed en la kvartalo El

Vedado, meze de Havano, inter Miramar kaj Malnova Havano. Mi elektis plej komfortan loĝejon apud la kongresejo kaj povis facile profiti de multaj allogaĵoj, kiel la marborda promenejo (Malecón), muzeoj, la universitato, ktp. Mi povis piede iri al la malnova urbo kaj ĝui la tipan kolonian arĥitekturon kaj etoson de tiu historia kvartalo. Mi eĉ reiris manĝi en hotelo, kiun mi malkovris tie en 2010 kun kongresaj amikoj, Hotel Florida. Mi sidis ĉe la sama tablo kiel en 2010 kaj vidis la pianon, kiun ludis Jeremio Bass.

Ĉiam estas agrable iri al Kubo kaj ne nur pro la suno kaj strandoj. Por mi estas ĉefe pro la enloĝantoj. La homoj estas simplaj, afablaj, helpemaj kaj gajaj. Ili ne estas riĉaj homoj laŭ niaj normoj, sed tiom malavaraj kaj amikemaj. Ili ŝatas renkonti fremdulojn kaj tuj volas babili kaj lerni pri ilia devenloko. Mi memoras, interalie, pri la tago antaŭ mia reveno al Montrealo, kiam sub tipa ekpluvego de la posttagmezo mi haltis sub ŝirmilo en la strato, kaj juna universitata studento ankaŭ ŝirmiĝis kelkajn minutojn kontraŭ la pluvo kaj ekbabilis kun mi. Li aspektis tute ne riĉa kun siaj difektitaj ŝuoj, sed tre inteligenta kaj simpatia. Estas tiaj simplaj spontanaj kontaktoj, kiuj riĉigas vizitanton al Kubo. Kiam estos la 7-a kongreso ?

MeKaRo 2016 en Granby : aliĝu nun !

Venu al la retejo mekaro.ca kaj aliĝu al la plej granda semajnfina renkontiĝo de Esperanto en Norda Ameriko : MeKaRo (la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto). Ĉi-jare la renkontiĝo okazos en Granby, Kebekio. La aranĝo estos amika, familie orientita kaj turisma : estos ekskursoj, komunaj manĝoj, bierumado, muziko, amuzaĵoj kaj multe da esperantumado en malstreĉita amikeca etoso. Vi ne volas maltrafi ĉi tiun okazon ĝui Esperanton !



Poliglota Novjorko

Nicolas Viau

Nicolas Viau est allé à New York en octobre pour assister à un événement destiné aux polyglottes et autres amoureux des langues : la « Polyglot Conference NYC 2015 », qui a lieu chaque année depuis trois dans une ville différente (à ne pas confondre avec la rencontre « Polyglot Gathering » en Europe). Comme il nous le rapporte, l'espéranto aussi était présent !

Ĉi-jare mi decidis pasigi la Dankofestan semajnfinojn en Novjorko, en loko, kie troviĝis sufiĉe multaj Esperanto-parolantoj, ŝatantoj de lingvoj, vojaĝemuloj, homoj el la plej diversaj devenoj. Ĉu ARE ? Ĉu alia Esperanto-aranĝo ?

Ne ! Temas pri la tria Poliglota Konferenco (Polyglot Conference NYC 2015) en Novjorko, okazinta la 10-an kaj la 11-an de oktobro en la teatro « SVA Theatre » en Manhatano, kies ĉeforganizanto estas la Novjorka poligloto Ellen Jovin. Pri kio temas ? Temas pri renkontiĝo de homoj bone konataj al Esperantistoj — ĉar multe el ĉi-lastaj jam estas — lingvemuloj !

Lingvemuloj

Kiuj estas tiuj lingvemuloj ? Homoj, eble kiel vi, kiuj ŝatas lerni lingvojn kaj ankaŭ ofte pri lingvoj kaj lingvistiko. Interreto, kiu multe helpis disvastigi kaj instrui Esperanton al novaj parolantoj, ankaŭ helpis lernantojn de aliaj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj... Oni trovas, ekzemple, senpagajn kursojn, povas plibonigi sian scipovon parolante pere de Skype aŭ aliaj rimedoj... Estas multe pli da ebloj lerni ol antaŭe, eĉ por izolitaj lernantoj, kaj certe por lernantoj de malpli parolataj lingvoj.

Kelkaj el tiuj lingvemuloj eĉ fariĝis famaj rete, kiel Benny Lewis, vojaĝanto kaj blogisto, kaj Judith Meyer, organizanto de la ĉiujara Poliglota

Renkontiĝo (Polyglot Gathering) de Eŭropo (ankaŭ ŝi ĉeestis), parte inspirita de E-aranĝoj. Ambaŭ parolas Esperanton.

Sed, same kiel Esperantistoj, multaj el ili ne emas nur lerni hejme kaj paroli pere de Skype — ili emas ankaŭ renkontiĝi en la vera vivo. Jen la kialo por tiaj eventoj !

Ankaŭ Esperanto

Ankaŭ multaj Esperantistoj apartenas al tiu lingvemularo, kaj eble deko da fluparolantoj de la lingvo partoprenis (ne temas pri preciza takso — verŝajne, pliaj havis almenaŭ iom da konoj pri Esperanto kaj aliaj almenaŭ aŭdis pri ĝi). Eble tio ne surprizu nin : multaj lingvemuloj interesiĝas ankaŭ pri artefaritaj lingvoj, kaj pri Esperanto aparte. Imageble, ekzistas ankaŭ « Duolingo-efiko ». Duolingo, populara retejo por lernado de lingvoj, enkondukis en printempo 2015 kurson de Esperanto celantan anglaparolantojn, helpe, interalie, de Chuck Smith, Judith Meyer kaj Ruth (« Margo ») Keves-Cohen (ili, feliĉe, ĉeestis la renkontiĝon) kaj helpe de aliaj dediĉitaj teamanoj, kiuj senlace prilaboris la kurson dum monatoj.



Temoj

Diversaj temoj estis priparolataj dum la prelegoj : lingvolernado, laborpostenaj ebloj por poliglotoj, lingvistiko, minoritataj lingvoj kaj planlingvoj. Ĉiam okazis du prelegoj samtempe (sed ĉiuj estis surbendigitaj), mi do ne povis ĉeesti ĉion, sed jen kelkaj prelegoj, kiujn mi aparte ŝatis, kaj kiuj donos al vi bonan ideon pri la enhavo de la prelegaro.

Rekonstrui la hindeŭropajn lingvojn

Lingvisto Timothy Doner prelegis, pri kiel oni povas rekonstrui la prahindeŭropan lingvon, kaj

kiel lingvoesploristoj malkovras la komunajn trajtojn de tiu grandega lingvofamilio (al kiu apartenas multege da eŭropaj kaj aziaj lingvoj el teritorioj situantaj de Islando ĝis Bangladeŝo). Ege interesa kaj pensiga temo !

Profesioj kaj lingvoj

Multaj lingvemuloj eble ŝatus uzi siajn kapablojn profesie, mone profitante de la granda (eĉ se plezura) laboro, kiun ili faras por akiri scipovon de pluraj lingvoj. Dum kelkaj prelegoj oni prezentis la diversajn laborpostenojn, kiujn iuj poliglotoj okupis danke al siaj kapabloj kun la celo pensigi la partoprenantojn pri la diversegaj ebloj malfermitaj al lingvemuloj en la labormerkato. Multaj fakoj, kiel instruado, teknologio, gastigado, kaj pluraj aliaj bonvenigas poliglotojn.

Stato kaj estonteco de la jida lingvo

La jida lingvo, tradicia lingvo de la aŝkenazoj (orienteŭropdevenaj judoj), kiu similas al la

germana, kun slavaj kaj hebreaj influoj, estas ĉefe priskribita kiel lingvo de la pasinteco, tial ke plimulto inter la hodiaŭaj aŝkenazoj (el kiuj multaj loĝas en Novjorko) uzas la lokan nacian lingvon anstataŭe. Sed ĉu vere la jida lingvo havas neniun estontecon ? Yakov Blum, Novjorkano kaj parolanto de la lingvo, prelegis pri la du apartaj nunaj parolantokomunumoj : ĥasidaj judoj (kiuj



sekvos rigoran interpreton de la religio) kaj la tiel nomataj « jidistoj » — homoj, kiuj plejparte ne parolas la lingvon denaske, sed tamen interesiĝas pri ĝi kaj lernis ĝin. Tiuj jidistoj celas ofte paroli la jidan inter si kaj organizas rekontiĝojn por pratiki ĝin, enlande kaj internacie. Ĉu tio ne memorigas vin pri alia

lingvokomunumo ? Ni lernis ankaŭ, ke kiel denaska lingvo ĝi tamen daŭre kreskas en Novjorko, pro la alta nask-indico de la ĥasida komunumo. Kvankam la du komunumoj ne multe interagas pro siaj malsimilaj vivstiloj, ŝajnas, ke Novjorko ĉiuokaze restos centro de vigla jidparolantaro dum ankoraŭ multaj jaroj. Interese, la preleganto (ŝerce) malfermis la prelegon per Esperantaj vortoj — el alia « juda lingvo », iumaniere.

Planlingvoj

Interesa por Esperantistoj estis ankaŭ la prezentaĵo de David J. Peterson pri artaj planlingvoj. S-ro Peterson profesie kreas planlingvojn por popularaj televidserioj. Li pasie kaj interese priskribis sian kreoprocezon, en kiu li atente elektas la trajtojn de novaj lingvoj, elpensante novan vortaron kaj amuzan fonologion... Li malkaŝis, ke, kvankam li kreis lingvojn, li ne nepre vere scipovas paroli ilin ! Lingvokreado kaj lingvoregado estas du tre malsimilaj aferoj !

Ne eblas ĉi tie priskribi la enhavon de ĉiuj prelegoj, sed oni parolis ankaŭ pri lernometodoj, la lingvoj de malplimultoj, la limoj de la homa lingvokapablo, la vivo de poliglotoj kaj multe pli...

Amikaro

Sed pli ol prelegaro, la Poliglota Konferenco estis bona okazo por renkontiĝi kaj amikiĝi kun aliaj lingvemuloj, en etoso iel esperanteca. Mi renkontis novajn homojn kaj eĉ novajn esperantoparolantojn kaj vizitis Novjorkon iom pli !

Ĉiuj prelegoj spekteblas rete ĉe YouTube :
<https://www.youtube.com/user/PolyglotConf>

La Konkursoj de Samideano

Revenas « Poezio el ĉiuj ĉieloj », konkurso starigita de itala samideano Giuseppe Campolo, kun la subteno de la kumunumo Sant'Angelo di Brolo (Mesino, Sicilio) kaj de Itala Esperanto-Federacio. Rajtas partopreni ĉiuj poetoj el nia planedo, per poeziaĵoj en la itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj. Oni devas sendi retpoŝte (en formato Word) al [<samideano@hotmail.it>](mailto:samideano@hotmail.it) nur unu poeziaĵon ne pli longan ol 50 versoj. La verkoj devas esti neeldonitaj kaj neniam premiitaj antaŭe. La plena anonco kun la aliĝilo estas akireblaj ĉe <http://iconcorsidisamideano.altervista.org/KonkursoPoemojIII.html>.

La ĉi-jara konkurso rĉiĝas per nova fako : « Romanoj el ĉiuj ĉieloj », verkoj tradukitaj en Esperanton el ĉiuj lingvoj. La anonco estas ĉe <http://iconcorsidisamideano.altervista.org/KonkursoRomanojI.html> (estas premioj !). La premi-ceremonio okazos la 18-an de oktobro 2016 en la komunuma Teatro de Sant'Angelo di Brolo (Sicilio, Italio).

Malpli oftaj fundamentaj vortoj (4)

Francisko Lorrain

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la kvara ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj []. Alta ^Z indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton, alta ^K citaĵon de Kalocsay.





★ **bask/o**. Ĉe vestoj, tiu parto, libere pendanta sub la talio : *kun ponardo kaŝita sub la ~o^K* ; *~o de frako*.

★ **bed/o**. Plata aŭ nivelita peco de grundo, preparita por plantoj : *flor~o*.

★ **border/i** (tr) **1** Garni per ornamaĵo la randon de tuko, vesto ks : *~i ĉemizon per punto*. **2** Garni la randon de io ajn, por ĝin plifortigi : *~i reton per ŝnuro* ; *~i bedon, trotuaron per ŝtonoj*. **~o 1** Tio, kio *~as* : *~o el galono, rubando*.

★ **briliant/o**. Diamanto kun aparta tajlo (du horizontalaj plataĵoj kunigitaj per facetoj) k brilpovo : (f) *la bela, ora, ~a sinjorino !^Z*. [Mi dubas pri la du horizontalaj plataĵoj. Por ke diamanto bone reflektu la lumon, plej taŭgas pinta suba parto. Vd. la ĉi-suban ilustraĵon de brilianto.]





AMU Poznanon... ankoraŭ !

Jenja Amis



En la studjaro 2014-2015 ESF lanĉis la kampanjon « AMU Poznanon », laŭ kiu la fondaĵo duobligas la donacojn de esperantistoj por stipendioj al gestudentoj de la Interlingvistikaj Studoj de Adam Mickiewicz Universitato (AMU) en Poznano. La kampanjo daŭras ankaŭ por tiu ĉi studjaro ! Ni elkore dankas ĉiujn, kiuj jam « amis Poznanon », kaj denove invitas esperantistojn al la partopreno !

Pasintseptembre grupo el 26 talentaj, entuziasmaj kaj laboremaj individuoj el 14 landoj venis al Pollando por komenci sian unuan jaron de la studprogramo pri interlingvistiko kaj esperantologio en AMU, la tria plej granda universitato de Pollando. Tiu ĉi estas rekorde granda grupo ekde la komenco de la

programo en 1998 ! Kelkaj gestudentoj veturas plurajn milojn da kilometroj ĝis Pollando por komenci en aŭtuno 2015 sian duan jaron en siaj studoj, sed nek la grandaj distancoj, nek la malvarmeco de la polaj vintroj, nek financaj malfacilaĵoj forprenas la entuziasmon de la gestudentoj : ili sentas sin privilegiitaj studi en Poznano kaj estas dankemaj al ĉiuj, kiuj ebligis ilian partoprenon en la programo, al la studoj mem kaj ties gvidantino, Ilona Koutny, al

Edukado.net kaj Katalin Kováts, al kelkaj el siaj landaj asocioj, kiuj trovis iom da mono en sia ne-ĉiam-aparte-abunda buĝeto por iom helpi la studojn, al ESF, kiu ebligis la stipendiojn, kaj, kompreneble, al ĉiu individuo, kiu donacis monon al la programo *AMU Poznanon*, kiun ESF lanĉis pasintjare por helpi financi la studojn



duobligante la donacojn ĝis \$2500.

Dum tiu elstara postdiploma trijara programo la studentoj venos al Poznano entute sesfoje (dufoje ĉiujare) por intensaj sesioj, faros nekalkuleblajn taskojn, alfrontos ekzamenojn, kreos la reton de kontaktoj kaj amikiĝoj, kaj la sepan fojon estos jam la fina ekzameno kun defendo de la diplomlaboraĵo. Ili enprofundiĝas en Esperantajn fonetikon, gramatikon, kulturon kaj literaturon, ili estos incitaj en la misterojn de interligvistiko, komunikado, semantiko kaj leksikologio kaj lernos pri pluraj aliaj interesaj kaj gravaj temoj de niaj plej elstaraj specialistoj (Humphrey Tonkin, Sabine Fiedler, István Ertl, Vera Barandovska-Frank, Ilona Koutny, Zbigniew Galor, por nomi nur kelkajn). Post la fino de la studoj ili mem instruos, laboros, esploros kaj portos la prestiĝon kaj profesian nivelon de Esperanto sur tute alian nivelon ! Komence de la nova sesio ni intervjuis kelkajn el ĝiaj partoprenantoj : Rafael Henrique Zerbetto, Karina Oliveira (ambaŭ el Brazilo) kaj Suso Moinhos (Galegio, Hispanio).

Rafael Henrique estas specialisto pri literaturo — pro tio aparte plaĉas al li studi Esperantan literaturon. Li intencas verki doktoriĝan tezon pri Esperanto kaj estonte instrui en universitato pri interlingvistiko kaj Esperanta literaturo, « temoj

malofte diskutataj en universitatoj de mia lando », konfesas Rafael. Dum siaj studoj en Poznano li estis ĝoja malkovri, ke la Esperanta literaturo estas multe pli valora kaj bunta ol li antaŭe supozis : « Mi

konatiĝis kun multaj verkoj kaj aŭtoroj, kiujn mi antaŭe ne konis, kaj danke al tio mi aktuale estas multe pli konscia pri tio, kio estas esplorinda kadre de Esperanta literaturo, kiel mi povas tion fari, kiujn materialojn mi havas disponeblaj kiel elirpunkto ». Krome, li perfektigis sian regon pri la lingvo kaj sciojn pri Esperanta kulturo kaj lingvistiko, afero tre utila por argumenti favore al Esperanto : « Tiusence la studprogramo en Poznano estas la pinta trejnado, kiu ekzistas en Esperantujo aktuale », diras Rafael. Al nia demando, kion li volus diri al donacintoj kaj esperantistoj ĝenerale, li diris, ke li volas certigi, ke indas investi en tiu programo, ĉar ĝi estas tre utila por kapabligi homojn kaj por la Esperanta movado, kaj por instrui kaj esplori pri Esperanto en universitata nivelo : « La ekzisto de tiu studprogramo pruvas, ke Esperanto funkcias kaj estas uzebla ankaŭ en universitata sfero ».





Karina, kiu magistriĝis pri lingvistiko en la Universitato de San-Paŭlo, nomas la interlingvistikajn studojn en Poznano « unikaĵo en la mondo », ĉar ĝi ja estas postdiploma kurso gvidada tute en

Esperanto. La plej plezuriga kaj riĉiga lernobjekto por ŝi estis la studoj pri interlingvistiko (ŝi estis studinta ĝeneralan lingvistikon, sed ne lingvistikon rilate al planlingvoj) kaj ŝi ŝategas studi lingvistikon uzante Esperanton kiel perilon por la lecionoj kaj debatoj. La studoj en Poznano estis ankaŭ la kialo de ŝiaj unuaj internaciaj vojaĝoj : « sperti vivantan Esperanton kaj vojaĝi al aliaj landoj estas mirinda sperto », diras Karina. Ŝi estas ege dankema al ĉiuj, kiuj helpas realigi tiun grandan studprojekton : « Kiel 24-jara junulino, mi estas en la komenco de mia profesia vivo, kaj mi ne povus memstare pagi por la vojaĝoj, kiuj estas tre multekostaj el Brazilo ĝis Pollando. Tamen, Brazila Esperanta Junulara Ligo subtenas miajn vojaĝkostojn per donacoj de esperantistoj por tiu celo. Kaj ankaŭ la subteno de ESF rilate al la studkotizoj estas afero, kiu montras al mi la profesiecon de nia komunumo ». La partopreno

en la studoj donas al ŝi bonegajn argumentojn kaj veran bazon por pravigi la studon pri Esperanto al la universitata departemento, al kiu ŝi estas ligita : « La plejmulto de la lingvistoj en mia universitato kutime pensas, ke Esperanto estas stultaĵo, sed pli kaj pli mi sukcesas montri, ke Esperanto estas serioza afero ». Ŝi aldonas, ke la kurso samtempe riĉigas la historion de Esperanto, ĉar oni skribas laboraĵojn, filmas prelegojn, kreas sciencan konon pri Esperanto, kaj samtempe ĝi estas fortega argumento por montri al la scienca « mondo », ke Esperanto vivas kaj estas ege interesa temo por lingvistikaj studoj. Al la donancantoj Karina ŝatus aparte danki, ĉar ŝia partopreno en la kurso absolute ne eblus sen tia monhelpo. La donacoj ja valoras la penon, diras Karina, « ĉar tiu kurso estas gravega por la Esperanta movado kaj la tuta historio de Esperanto mem ».

Dum siaj studoj **Suso** aparte ŝatis la eblecon profunde esplori pri diversaj aspektoj de la gramatiko de Esperanto, de ĝiaj kulturo kaj literaturo, sub la gvido de universitataj profesoroj : « Studi Esperanton universitatnivele, laŭ studprogramo komparebla al filologiaj studoj de etnolingvo, delonge estis mia revo », li diras. La studoj postulas multan tempon kaj dediĉon, kaj tio havas sekvojn en lia tuta ĉiutaga vivo : « En la unua jaro mi devis multon lerni : ne nur la



studobjektajn materialojn, sed ankaŭ esplormetodojn kaj teknikojn. Mi devis repreni sur miajn ŝultrojn la kutimon studi kiel en la unuaj universitataj

jaroj kaj porti ĝin al novaj kampoj ». Suso aparte aprezas, ke kaj la instruistoj kaj la gestudentoj venas el diversaj landoj kaj kontinentoj, el malsamaj profesiaj kaj studaj sferoj, ĉar tio povas nur riĉigi la vidpunktojn, la interŝanĝojn de opinioj, kaj igi la klason vera ekzemplo de diverseco kaj interkultura etoso. Alia forta punkto favore al la programo estas la internacia agnosko de la studoj kaj la fakto, ke ili « valoras » 120 kreditojn ECTS* : « Kiam mi komparis tion kun la galegaj universitatoj, mi surpriziĝis : iliaj filologiaj magistriĝoj estas dusemestraj kaj valoras nur 60 ECTS. » Dum siaj studoj Suso lernis unu plian gravan aferon : la kortuŝan solidarecon kaj helpon de nia parolanto-komunumo : « Al la donacantoj mi povas nur danki. Ili apogas nin decide, fidoplene, tra Esperantic Studies Foundation kaj Edukado.net. Mi klopodas respondi al tiu iniciato per miaj klopodoj en studado. La tago, kiam mi

eksciis, ke Esperantic Studies Foundation subvencios nin, mia revo ekrealiĝis. La programo AMU Poznanon estas laŭdinda, grandstreba formo de kunefiko ». Se vi volas kontribui al la ekzisto de fakuloj pri Esperanto, pensu pri la programo AMU Poznanon, rekomendas Suso : « Se vi volas trafe uzi monrimedojn, ajnakvante, por antaŭenpuŝi la internaciskalan valorigon de nia lingvo, konsideru la eblecon subteni ĉi tiun noblan ideon. Kaj se vi hezitas, provu rakonti pri la postdiploma kurso al neesperantistoj — vi miros pro iliaj respektplenaj reagoj ».

Kiel donaci al *AMU Poznanon*

rete ĉe esperantic.org/eo/amu,
per UEA-konto al ESF : esfo-p (skribu pri la ĝiro al financoj@co.uea.org, kopie al admin@esperantic.org, kaj indiku la celon de la donaco, *AMU Poznanon*).

Listo de donacintoj : esperantic.org/eo/poznano

Pli pri la programo : amu.edu.pl/~interl

* ECTS (European Credit Transfer and Accumulation System) estas internacie agnoskita eŭropa poent-sistemo de universitataj studoj (ĝi funkcias tra Eŭropa Unio kaj ankaŭ pluraj ne-eŭrop-uniaj landoj).



Feliĉan novan jaron... 1200 !



Sylvain Auclair

On connaît mes intérêts inhabituels : espéranto, vélos à position allongée (ou à position debout) et... système duodécimal.

Mi rakontas ĉi-supre, ke mi konsideras, ke same kiel Esperanto plifaciligus la interpopolajn rilatojn, la uzo de dekduuma nombrosistemo plifaciligus multajn ĉiutagajn kalkulojn. Bedaŭrinde, tradicio pli pezas ol utilo en tiaj kampoj.

Dekduumaj nombroj bezonas du pliajn ciferojn por noti la dekumajn nombrojn 10 kaj 11 (ofte A kaj B, aŭ X kaj E, sed proponoj svarmas), sed ankaŭ novan manieron elparoli la nombrojn. Oni ja povas konservi la nomojn nul ĝis dek, sed oni devas aldoni novajn nomojn por dekunu kaj dekdu, por 144 (unu groco), por 1728 (unu granda groco).

Esperantista dekduumemulo elpensis almenaŭ du sistemojn por eldiri la dekduumajn nombrojn, ĉiam uzante ĝis nun ne uzitajn radikojn. En ambaŭ, la nomo de 11 (A aŭ E) estas elv. Post tio ekestas la diverĝo.

Li unue pensis pri la nomo *dod* por dekdu, laŭ la greka *δώδεκα*. Por groco, oni dirus... *groc*, kaj

granda groco (1728) estus *taŭs*, de la ĝermanaj lingvoj por *mil*. Tiel, la pasinta jaro estus *taŭs - groc - elvdod - elv* (11EE), kaj la nuna jaro elparoliĝus *taŭs - dugroc* (1200)

Li poste adaptis al Esperanto elparolmanieron, kiun li unue elpensis por la angla. La bazo nomiĝus *zod* (laŭ la zodiako*), la groco estus *zent* (laŭ cent) kaj la granda groco, *zil* (laŭ mil). Por pli altaj nombroj, li proponas novan uzon de la prepozicio *je* : *zil je 3* estus 1 000 000 000, dekduume (ou zodume!), kio estas 5 159 780 352...

Verkita en la jaro zil-zent-elvzod-elv, ĵus antaŭ la jaro zil-duzent... Feliĉan novan jaron al ĉiuj malgraŭ tio !

Vidu la originalan tekston [ĉi tie](#).

* La vorto *zodiako*, fakte, havas neniun rilaton kun dekdu : ĝi venas el la helena *ζωδιακός*, *zōidiakós*, (*cirklo*) de la bestetoj, samradike kiel la vorto *zoologio*.

Tankaumis ARE-anoj

Lors de la dernière ARE (Autuna renkontiĝo de Esperanto), plusieurs participants se sont initiés à une forme japonaise de poésie, très ancienne, le tanka, guidés par Steven Brewer.

Jen kvar tanka-oj (tradiciaj japanaj poeziaĵoj) verkitaĵoj dum ARE 2015, sub gvidado de Steven Brewer. Kokektis ilin Minjo Renaud. Iliaj aŭtoroj bonvole permesis al ni publikigi ilin.

En frua maten'
dancistoj ekzerciĝas
kun bela muzik'

Mi malgajis pro la fin'
de l' trankvila movado

Dena Alexander

Tankaon krei ?
Mian animon tuŝi ?
Bone mi pretas.

Sed malkovros kion mi ?
Kaj ŝanĝiĝos kiel mi ?

Marteno Morris

Por Ĵenja

Blondaj haroj jen
slava animo en ŝi
denove kun mi

Ni ĝuas tro malofte
Haste pasas la tempo

Tamara Anna Koziej

Ne dormu kara
vivo bezonas vin nun
Senĉesa bruo

tamen ja sekuriga
kaj feliĉiga tiu ĥaos'

Tamara Anna Koziej

Tri poemoj de Eudore Évanturel (1852—1919)

Voici des traductions en espéranto de trois poèmes d'Eudore Évanturel, dont on dit qu'il aurait été le premier « poète maudit » québécois.

La ignorata tombo

Ie — mi scias kie — apud saliko, kiu
Kreskadas sunignore, kiam printemp' invitas,
Jen tombo, kiun en muskamaso serĉis iu,
Montras sur sia kruc', ke nenia nom' skribitas.

Neniu miascie venis en la vespero
Preĝi plorante, genufleksante sur la ŝtono ;
Sed en ĉi loko sobas tutcerte kun mistero
Anĝelo dum mortanta kaj trista tagodrono.

Floroj ne vivas tie, kaj morto nur kolektas
La fojnon forgesitan de l'falĉista laboro.
Apenaŭ, foli' foje, somere, sin direktas
— salika trista larmo — ĉi tien, kvazaŭ ploro.

Mi celis tiun tombon ignoratan revidi ;
Sed kiam serĉis mi la vojon, senakompana,
Iu staris, kiu malpermesis nun viziti :
Jen la Forges', pensema, kaj kun la frunt' enmana.

Kvietigo 187

Kiam mi emas fari nenion ajn, eldome
Foriras mi kun trista kaj moroza animo,
Per paŝo malatenta kaj lanta famdiskone
Kaj frunto kliniĝanta timide al pavimo ;
Mi promeniĝas miajn doloron kaj deliron
Soligan, ĝis lok' ajna, apud rivero, kie
Finfine povas mi spekti belan sunsubiron.

O ! Kiom miaj revoj impresas emocie,
Dum tiu marŝo en la trankvilo de l' soleco,

Kiam rekvietigo ekregas pro laceco.

Pli bone fartas mi.

 Mi iras, kien min gvidas

Mia koro, kaj, foje, songanta, ie sidas,

Pri tio senkonscia, sola en nokta bruno ;

Min surprizas tiam la soro de la luno.

Promenado

Ŝategas mi la vidon de tagleviĝ' postpluva.

La suno viŝas sin post borado preternuba,

Kontenta kiel turko elire de la bano.

La urbo dormas. Eblas iri al la ebena,

Je l' unua radio, kiun semas mateno,

Por spiri l' aromojn, de la kampar' emanon.

Aŭroron dumaŭtunan ja pleje mi preferas.

Fenestro taga per pli pala ruĝ' ekmalfermas

Sin, kaj ekĵetas foren radiojn iom flavajn.

Jen estas temp' por spekti vestiĝon de la bluaj
Floroj. Oni, senscia, revanta, marŝas plurajn
Leŭgojn, herbejmeze, laŭlonge de padoj ravaj.

Estas maten' oktobra, iom melankolia.

Horpaso. Mi revenas per voj' institucia.

La suno jam pli altas. Varmiĝis ventoblovo.

La pegoj ne plu estas en l' arbaro rubena ;

Marŝante, songas mi pri l' fotel' apudkamena,

Kiu enuas, kaj ja pri mia kafobovlo.

Noto :

Esperantigis tiujn poemojn Jopetro Danvy el Francujo. Pri Eudore ÉVANTUREL vidu la [francan Vikipedion](#). La poemoj prezentataj ĉi tie estas el lia libro *Premières poésies, 1876—1878 ; avec une préface de Joseph Marmette, 1^e édition, Québec : Augustin Côté, 1878*. Tiu eldono elŝuteblas kiel pdf-dosiero el [BAnQ](#). La originaj titoloj de la tri poemoj estas « La tombe ignorée », « Soulagement » kaj « Promenade », je paĝoj 101, 187, 51 respektive.



Literature
La Idoj de la Suno

Dennis Drown

Ĉapitro 7

(legu la komencon en *La Riverego* 114 : esperanto.qc.ca/eo/riverego)

Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.

- *Eliro, Ĉapitro 20*

Barbara karesis la malhel-nigran hararon de Ĝarelo, dum ŝi rigardis lian vizaĝon. Liaj okuloj estis fermitaj. Li aspektas tiom dolĉa, ŝi pensis, tiom paca. Ŝi konturumis liajn lipojn per sia fingro.

Ĝarelo malfermis siajn okulojn. « Eh ! Tio tiklas. » Li ridetis al ŝi. « Kion vi faras al mi ? »

« Plaĉas al mi tiuj ĉi lipoj, » ŝi respondis. « Viaj lipoj estas belaj. Mi pensas, ke ili vokas al mi. Ili ŝajne petas kison. »

« Vi devas kisi ilin do. Neniu volus malkontentigi lipojn. » Li paŭtigis siajn lipojn.

Barbara kisis lian frunton anstataŭe. « Ili atendu iomete, mi pensas. Tiel ili pli valortaksos la kison, kiam ili ricevos ĝin. » Ŝi ridetis al li scieme.

Jam tri monatoj estis pasintaj, kaj Barbara apenaŭ povis kredi tion. Preskaŭ ĉiun tagon ŝi kaj Ĝarelo vidis sin. La maizkampo estis ilia speciala kaj sekreta loko. Li estis la reĝo de la maizuloj, kaj ŝi estis lia diino, veninta al la Tero de la ĉielo, ne memorante sian propran diecon. Dum tagoj, kiam iu alia devis prizorgi la kampon, kaj Ĝarelo ne devis esti tie, ili promenis kune en la montetaro.

Ŝi pensis tiam pri sia frateto kaj ridetis. La kompatinda bubo volis veni kun mi denove hodiaŭ. Nuntempe ŝi ofte permesis, ke li akompanu ŝin. Lastatempe ŝi ne trovis lin ĝenema, almenaŭ ne tiom, kiom li estis antaŭe. Ŝi preskaŭ pensis pri li, kiel amiko. Tiom li estis helpanta ŝin pri la Taŭakla lingvo. Li eĉ helpis ŝin

instrui iom de la angla al Ĝarelo, kiam tiu juna reĝo diris, ke li volas lerni la sanktan lingvon de la blanka diino kun oraj haroj kaj okuloj de safiro. Plej grave, tamen, ŝi povis paroli al sia frato pri Ĝarelo. Li estis la sola, al kiu ŝi povis konfidi pri li.

Tamen ŝi ne volis, ke Roĉjo venu ĉi-foje. Hodiaŭ estis speciala tago. Hodiaŭ estis la tri-monata datreveno de ilia renkontiĝo, kaj ŝi volis esti sola kun Ĝarelo.

« Kisu min, mia diino. Kisu miajn lipojn. »

Barbara ridis. « Mia patro mortigus min, se li scius, ke mi permesas al vi nomi min diino. Vi scias tion, ĉu ne ? »

« Sed vi estas la diino de via Kristana dio. » Liaj okuloj brilis, dum li ridetis al ŝi. « Cetere mi konas diecon, kiam mi vidas ĝin. Vi estas mia diino, mia bela, sankta diino. Ĉiuokaze, plaĉas al vi, kiam mi parolas tiel ĉi pri vi. Estas pro tio, ke vi scias, ene de via koro, kiu vi estas. Vi ne povas nei tion. »

Li pravis. Ja plaĉis al ŝi tio, esti lia diino. Ŝi rememoris, kiam ŝi diris al Roĉjo, preskaŭ flustrante, pri la reĝo de la maizuloj kaj ties bela diino. Roĉjo turnis siajn okulojn al la ĉielo pro troa abundo de dolĉeco.

Tiom da sekretoj ŝi nun konfidis al sia frateto.

Barbara sentis trankvilan ondon de ĝojo kaj plezurspiris. Meze de la dezerto ŝi trovis gemon. Nun ŝi estis kuŝanta en maizkampoj en bela posttagmezo, ĉirkaŭata de konusaj maizuloj, la restaĵoj de la lasta rikolto, rigardanta la sunon, dum ĝi ŝvebis majeste malantaŭ la montetoj, kun tiu ĉi magia knabo en siaj brakoj—knabo, kiun ŝi amis.

Ŝi ja amis lin, kaj ŝi diris tion al li, unue en la angla kaj poste en la Taŭakla. Estis freneza ilia maniero komuniki. Li parolis al ŝi precipe en sia lingvo, kaj nun ŝi komprenis la plejmulton. Ŝi, tamen, parolis al li precipe anglalingve, kaj ankaŭ li komprenis ŝin. Foje ili uzis la lingvon de la alia, kaj ofte Roĉjo helpis ilin. Ja estis freneze, sed iel tiu frenezo estis grava parto de ilia amo. Ĝi aldonis ian aventuran energion al la emocioj, kiujn ili ambaŭ sentis. Ĝi estis ludema frenezo, amuza frenezo, kaj la fakto, ke ili povis iom regi ĝin kaj kompreni unu la alian, estis kiel flustro en ŝia orelo—flustro de ies dio ie—, ke ja estas la destino, kiu kunigas ilin.

« Mi amas vin. Vi scias tion, ĉu ne ? »

« Jes, mi scias. Pro la amo de mia diino, mi estas la plej forta el ĉiuj reĝoj, kiuj superregas maizulojn. Kaj via reĝo amas sian diinon. Li ne konis belecon, ĝis li vidis ŝin la unuan fojon. Li ne sciis la kialon por kiso. Li sciis nenion pri la amo,

kiun viro havas por virino. »

« Vi ĉiam parolas poezie. Vi estu la triba rakontisto. » Nun ŝi kisis lin sur la lipoj.

Li ridetis al ŝi, tiam malridetis. « Mi amas vin. Estas malĝuste, ke ni havas nur kelkajn horojn tage por esti kunaj. Ĉi tiu kampo estas nia loko, sed mi volas povi vidi vin ankaŭ en la vilaĝo. Ni jam estas kunaj dum tri monatoj. Kiam ni diros al ĉiuj ? » Li prenis ŝian manon kaj kisis ĝin tenere. « Vi diris, ke via familio venis tien ĉi, por ke ni povu koni nin, unu la alian. Jen, ni estas la perfekta interkonekto inter niaj du popoloj. Kial ili ne sciu ? »

Bildo formiĝis en la menso de Ĝarelo, kaj li ridetis. Tiu bildo donis al li pacon. Ĝi ekmontris eblecon esti parto de io granda, io pli grandioza ol io ajn, kiun li iam ajn konis en sia vivo.

« Ni estas la ponto, Barbara. »

« Pensu, Ĝarelo. Mia patro ne aprobus, ke mi havu koramikon. Nervozigas lin, kiam knabo, iu ajn knabo, alproksimiĝas al mi. Li ĉiam estis tia. Li volas protekti sian knabinecon. Mi supozas, ke li imagas, ke iun tagon mi edziniĝos, ke mi estos perfekta fianĉino en blanko por iu estimata juna sinjoro. Sed li certas, ke tiu tago ne venos baldaŭ, kaj por nun li volas, ke lia filineto estu pura. Li

volas, ke ŝi estu netuŝita. »

« Kaj se mi estus la estimata sinjoro ? Mi edzinigus vin. Mi amas vin. Vi ne scias kiom. Vi estas mia diino. »

« Mi scias tion, kaj ankaŭ mi amas vin. Tamen mi ne kredas, ke mia patro... »

« Mi ne povus esti la estimata sinjoro ? » Ĝarelo rigardis ŝin tiel, kvazaŭ ŝi ĵus manfrapis lian vangon.

« Ĝarelo, karulo, plaĉas al mi la ideo, sed ial mi sentas, ke mia patro ne opinius same. »

« Sed kial ne ? Ĉu mi ne taŭgas ? Mi estas bona persono, kaj mi amegas vin. Neniu povus ami vin tiom, kiom mi. »

Subite en liaj okuloj ekestis kolero. « Sed mi ne estas tuvfa ! Mi ne estas de via mondo. Ĉu pro tio ? Mi estas Taŭakla. Tio estas la problemo, ĉu ne ? »

Barbara rigardis lin, ne sciante kion diri. Larmo kuris tra lia vango. Ŝi prenis lin en siajn brakojn kaj premetis lin tenere. Ŝi volis, ke li sentu sin sekura.

Ĝarelo tiris sin el ŝia brakumo. « Sed estis vi, kiu venis al ni. Estis vi ! Mi pensis, ke vi venis, por ke la Taŭakla estu parto de via mondo, sed kiel ni

povas ? Ni ne povas ami vin. Ni ne rajtas tuŝi ! Ni konu vian dion. Ni adoru lin, sed ne kune kun vi, ĉu ne ? Ni ĉiam estos sub vi. Vi estos la mastroj, kaj ni viaj subuletoj.

Ni eĉ ne plu estos la Taŭakla. Ni estos popolo, kiu perdis sian econ, dum ni restos ĉe viaj piedoj ! »

Li plorsingultadis nun.

« Trankviliĝu, kara, » ŝi flustris kaj ekkaresis lian dorson. « Vi scias, ke mi ne pensas tiel. Mi amas mian reĝon. Neniam forgesu tion. Iun tagon ni diros al mia patro. Ni diros al ĉiuj, kaj ili akceptos nin, ĉar ili amas nin. Sed tro fruas por paroli serioze pri geedziĝo. Ni konas nin nur dum tri monatoj. »

« Sed mi ja edzinigus vin. Mi farus tion hodiaŭ. »

« Mi scias, karulo. » Ŝi viŝis liajn larmojn for kaj kisis lian frunton. « Ne zorgu. Mi scias tion. Nun ridetu por via diino. La blanka diino ordonas, ke vi ridetu. »

Ĝarelo ne volis rideti, sed li rigardis supren al ŝi. En ŝiaj okuloj li vidis la amon, kiun ŝi havas por li. Ĝi trankviligis lin, kaj la frenezaj emocioj, kiuj tiom skuis lin antaŭ momento, nun ekforfluis el li. Dum ili lasis lin, li sentis sin malforta, kruda, kaj li lasis sin refali en ŝiajn brakojn. Kuŝante tie, li silente

esperis, ke ŝi rekomencu karesi lian dorson.

« De kie venis tiuj vortoj, Ĝarelo ? » demandis Barbara. « Vi estos sub ni ? Vi perdos vin kaj restos ĉe niaj piedoj ? Vi diris, ke via patro pensas tiel. Ĉu li pravas, laŭ vi ? Ĉu vi pensas, ke ni volas detrui vian kulturon ? »

« Ne, » li respondis mallaŭte. « Mi ne scias. Ne, mi ne pensas, ke vi volas tion. »

« Sed eble mia patro ? »

« Mi ne vere scias, Barbara. Mi eĉ ne konas lin. Miaj tribanoj ne scias, kion pensi. Ĉiuj opinias malsame. Multaj scivolas pri via patro kaj lia dio. Ili volas scii pri via mondo. Aliaj timas ŝanĝojn. Nia saĝulo diras, ke ni ja detruiĝos pro la ŝanĝoj, kiujn alportas via patro. Mia patro fortege kredas tion. »

« Do, vidu, jen alia kialo, pro kiu ni gardu nian sekreton dum iom pli da tempo. Via patro maltrankviliĝos, ankaŭ mia patro. Ni ne atendos ĝis eterne por diri al ili, Ĝarelo. Post nelonge mia patro finos konstrui sian preĝejon. Li komencos siajn diservojn por via tribo, kaj li sentos sin multe malpli streĉita. Same kun viaj tribanoj, ili jam scios pli pri ni kaj pri la mesaĝo, kiun mia patro havas por ili. Ĉio estos multe pli trankvila. La tribanoj kutimiĝos al ni, kaj la tempo pli taŭgos. » Barbara

ekkaresis denove lian dorson, kaj li plezurspiris mallaŭte. « Ankaŭe, post pli da tempo, nia amo estos eĉ pli forta ol nun. Ili devos akcepti nin. »

Ĝarelo aspektis pensema dum momento. « Post du monatoj venos la unuaj pluvoj, » li diris. « Ĉiuj festos, ke la dio Ŝaak benis nin per alia pluvsezono. Ĉiuj ĝojos en tiu tempo. Eble tiam ni diru al ili. Estos ankaŭ multe da laboro, do ili havos ion alian, pri kio pensi. Jam ili eklaboras, preparante la sterkon, por kiam ili plantos la maizgrajnojn. Post nelonge ili disigos la maizulojn. Ili estos feliĉaj pro la venontaj pluvoj. Do, eble tial ili povos feliĉi ankaŭ por ni. Aŭ almenaŭ ili estos tiom okupitaj, ke ili ne tiom zorgos pri ni. Ankaŭ via patro estos okupita pro siaj diservoj, ĉu ne ? »

« Mi ne certas ĉu estos tiom malfacile, kiom vi pensas, » Ĝarelo daŭrigis. « Via patro sugestas, ke niaj popoloj konu sin reciproke. Nia ĉefo diras, ke eble ni devas esplori vian mondon, la mondon, kiun vi alportis al nia vilaĝeto. Pro nia amo, vi kaj mi jam kreis ponton inter niaj du kulturoj. Ni jam vivas tion, pri kio ili parolas. Eble ni ne zorgu tiom multe, Barbara. »

Li suprenrigardis al ŝi. Nun li ridetis, kaj ŝi vidis denove la brilon en liaj okuloj. Ŝi amis tiun brilon.

Ŝi ja zorgis tamen.

Valoregaj publikaĵoj interrete

Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko nuntempe skanas grandan parton de la publikaĵoj pri la unuaj 31 Universalaj Kongresoj de Esperanto, la unuajn librojn kaj periodaĵojn en Esperanto. Multaj valoregaj materialoj jam estas haveblaj en la interreto !

Universalaj Kongresoj 1905-1939


<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/23525.htm>

Skinitaj libroj

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

Skinitaj periodaĵoj

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>





Flago por klimatprotekto

Flagoj povas reprezenti multajn aferojn: landojn, urbojn, lingvon aŭ alian celon, kiel protekto de la klimato kontraŭ planeda plivarmiĝo.

Usona senprofitcela organizo (www.climateflag.org) kreis tian flagon kaj senpage disdonas ilin — laŭ la ricevataj donacoj. Ĝi ankaŭ permesas al iu ajn fari sian propran. Sufiĉe bela ĝi estas, kun flava, blanka, blua kaj verda bendoj, kun greka cirklo. Kvankam estas klare, ke la cirklo reprezentas la Teron, la signifo de la kvar bendoj estas libera : akvo, aero, lumo, plantoj, k.s.

Sylvain Auclair

Naskiĝis Norda Stelo

La grava kanada konsilingeria firmao Roche Ltd. el la urbo Kebeko), fondita en 1963, adoptis novan nomon : Norda Stelo.

La nom-ŝanĝiĝo okazis en decembro 2015, kaj ĝi reprezentas transformiĝon kaj la renoviĝon de la kompanio : la novan direkton, kiun la kompanio prenis en 2013. En la komuniko la firmao mencias, ke tiu ĉi nomo venas el Esperanto. Norda Stelo havas pli ol 1300 dungitojn kaj 40 oficejojn en 50 landoj. Legu pli ĉe www.norda.com

Raportis Trefflé (Trefleo) Mercier



Esperanto-renkontiĝoj

21 — 23-a de majo 2016: 13-a MEKARO

Granby, Kebekio

28-a de junio — 3-a de julio 2016 : NASK

Raleigh, NC

8 — 11-a de julio 2016 : kongreso de E-USA

Miami, FL

16 — 23-a de julio 2016 : 72-a IJK

Vroclavo, Pollando

23-a de julio 2016 : 101-a UK

Nitra, Slovakio

8-10-a de oktobro 2016 : 23-a ARE

Silver Bay, NY

20 — 22-a de majo 2017 : 14-a MEKARO

Hamiltono, Ontario

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo, 8-a de aprilo 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 29-a de aprilo 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 13-a de majo 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 10-a de junio 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 9-a de septembro 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 30-a de septembro 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 14-a de oktobro 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Pli pri la horaro : ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites>. **Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien)** : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair, François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2016.05.20
3-3791, av. Linton • Montréal • H3S 1T3 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

Vizitu nian retejon !
Visitez notre site web !
www.esperanto.qc.ca

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :
www.pasportaservo.org.
Vi povas ankaŭ kontakti
Ĵenja-n Amis
(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

